# Jarraporto por Grupo Esperantista de Trondheim, 2021 kaj 2022

## Okazintaĵoj

### Klubaj kunvenoj

Pro la pandemio la klubo ne kunvenis fizike dum 2021, sed ni kunvenis tri fojojn per la interreta programo Zoom. La jarkunveno okazis la 11an de marto (5 partoprenantoj), okazis funebra kunveno por Arne Olav Mjøen la 8an de aprilo (7 partoprenantoj), kaj unu pli ordinara kunveno okazis la 12an de aprilo (5 partoprenantoj). Averaĝe partoprenis 5,7.

En 2022 la klubo kunvenis tri fojojn per Zoom, unu fojon fizike kaj aldone aranĝis unu feston. La interretaj kunvenoj okazis 7an de februaro (7 partoprenantoj), la 21an de februaro (5 partoprenantoj) kaj la 21an de marto (3 plenkreskaj partoprenantoj kaj 1 infano). La klubo kunvenis fizike la 24an de oktobro (4 partoprenantoj), kaj aldone aranĝis ĝardenan feston la 26an de junio (9 plenkreskaj partoprenantoj kaj 2 infanoj). Ne okazis jarkunveno en 2022. La kvar ordinarajn kunvenojn averaĝe partoprenis 4,8.

Kompare, en la ordinaraj klubkunvenoj de la ne-pandemiaj jaroj 2006–2019 partoprenis meznombre: iom malpli ol 7; inter 6 kaj 7; 6,6; 6,5; 7,1; 6,9; 6,9; 7,4; 6,8; 6,6; 6,4; 5,1; 5,2; 4,7; kaj 6,8 en 2020.

### Forpaso de Arne Olav Mjøen

Nia membro kaj amiko Arne Olav Mjøen havis 90 jarojn la 22an de marto 2021, kaj GET sendis florojn kaj saluton okaze de lia festo la 20an de marto.

Mallonge poste li malsaniĝis, kaj li forpasis la 25an de marto. La funebra ceremonio okazis en la preĝejo de Tiller la 8an de aprilo. Pro la pandemio oni povis akcepti nur 30 ĉeestantojn. Reprezentantoj de la klubo estis Torstein Kvakland kaj Jardar Eggesbø Abrahamsen.

Dum la ceremonio la filo Eirik bedaŭris ke pro la pandemio oni ne povis inviti al memora kunestado. Li proponis ke anstataŭe oni plenigu la glason per kio ajn je la 21a horo tiun vesperon kaj memoru Arne Olav. La klubo kunvenis per la interreta programo Zoom je 20:50, kaj tostis memore al Arne Olav je la 21a horo, kelkaj eĉ per vino farita de Arne Olav.

### Varbado, kursado kaj informado

Ne okazis kursoj en Trondheim en 2021 aŭ 2022, kaj ne okazis aktiva varbado. Ne estis mencioj pri GET en la gazetaro, sed Jardar Eggesbø Abrahamsen intervjuiĝis pri Esperanto en retartikolo ĉe NRK en oktobro de 2021, kaj laŭtlegis frazojn por kvizo tie.

### Membrostatistiko

En 2021 kaj 2022 GET havis 13 membrojn laŭ la jarraporto de NEL. La repago de NEL en 2022 indikas ke ni verŝajne havis 12 membrojn. (Por la jaroj ekde 2006 la nombroj estis respektive: 25, 23, 21, 20, 19, 17, 15, 16, 15, 16, 16, 14, 13, 12, kaj 11 en 2020). Ekde 2019 NEL kalkulas la klubsubtenon laŭ la membronombro la 31an de oktobro, antaŭe la 31an de decembro.

### Partopreno en naciaj aranĝoj

La 5an kaj 6an de junio 2021 okazis la Landa Kunveno de NEL per la interreta konferencprogramo Zoom. Partoprenis 3 el Trondheim: Jardar Eggesbø Abrahamsen, Judith Parelie Abrahamsen kaj Herman Ranes. Ankaŭ GET-ano Ulf Lunde en Os partoprenis.

La 4an kaj 5an de majo 2022 okazis la Landa Kunveno de NEL per Zoom. Partoprenis 3 el Trondheim: Jardar Eggesbø Abrahamsen, Judith Parelie Abrahamsen kaj Herman Ranes.

**Partopreno en internaciaj aranĝoj**
Okazis pluraj internaciaj aranĝoj en la reto. En 2021 Herman Ranes partoprenis la 2an Virtualan Kongreson de Esperanto, organizita de UEA. Tamen precipe menciindas ke niaj amikoj en Darmstadt, ĝemela urbo de Trondheim, ĉiusemajne aranĝis ĝemelurbajn rondojn konversaciajn per la interreta konferencprogramo Skype. Partoprenantoj, ne ĉiam samtempe, estis Herman Ranes, Ulf Stenhaug, Jardar Eggesbø Abrahamsen kaj Judith P. Abrahamsen.

En 2022 Herman Ranes partoprenis la Universalan Kongreson de Esperanto en Montrealo. Pludaŭris ankaŭ la retaj kunvenoj kun Darmstadt.

**Vortara laboro**
Jørgen G. Bosoni respondecas pri la vortara projekto. Ne estis aktiveco dum 2021 kaj 2022, sed oni ekdiskutis ke io devus okazi.

**Interreta aktivado**
GET havas retpaĝon kun la kunvenprogramo. Jardar E. kaj Judith P. Abrahamsen redaktis kaj tiun paĝon kaj la paĝaron de NEL. Jardar ankaŭ administris la jenajn retpoŝtajn listojn: GET-lista, NEL-diskut (malfondiĝis en 2021) kaj NEL-inform. Judith kunadministris la paĝaron de NJE.

Je la jarfinoj de 2021 kaj 2022 membris 16 en la retpoŝta listo de GET (por la jaroj 2006–2020 estis respektive 24, 26, 25, 25, 23, 23, 21, 22, 22, 20, 19, 19, 19, 16, 16). Ne ĉiuj membras en la klubo. Dum 2021 sendiĝis 37 mesaĝoj per la listo, kaj en 2022 sendiĝis 42 mesaĝoj (por la jaroj 2012–2020 respektive: 68, 96, 45, 56, 38, 66, 51, 97, 20).

**Biblioteko kaj aliaj libroj**
La kluba biblioteko ankoraŭ restas en skatoloj hejme ĉe Herman Ranes.

**Arĥivo**
La kluba arĥivo restas hejme ĉe Torstein Kvakland kaj Christian Fossen.

**Pasporta servo kaj aliaj vizitoj**
Gastigantoj de Pasporta Servo en Trondheim estas Ulf Stenhaug kaj Torstein Kvakland/Christian Fossen. Ili nek gastigis nek gastis dum 2021 kaj 2022.

**Ekstera mono**
Jam en 2009 GET registriĝis en Enhetregisteret kaj Frivillighetsregisteret en Brønnøysund, kaj ricevis la organizan numeron 994 914 146. Ni ankaŭ membriĝis en Grasrotandelen, kaj ekrajtis ricevi monon de Norsk Tipping se iliaj klientoj volas. Dum 2021 Norsk Tipping pagis al la klubo 3447,29 kronojn, kaj dum 2022 ili pagis 4112,45 kronojn (3625,58 en 2020). La klubo ankaŭ membras en *Studieforbundet næring og samfunn*, kiu dum 2021 kaj 2022 pagis al la klubo 0 kronojn (0 en 2020).

## Postenoj

**Estraro dum 2021 kaj 2022, elektita de la Jarkunveno la 11an de marto 2021**
Prezidanto: Torstein Kvakland (reelekto)
Kasisto: Ulf Stenhaug (reelekto)
Sekretario: Jardar Eggesbø Abrahamsen (reelekto)
Estrarano: Herman Ranes (reelekto)
Anstataŭanto: Christian Fossen (reelekto)

**Aliaj enklubaj postenoj en 2021 kaj 2022, elektitaj de la Jarkunveno la 11an de marto 2021**
Revizoro: Bergny Dahl (reelekto)
Kunordiganto de la vortara projekto: Jørgen G. Bosoni (reelekto)
Responsulo pri la biblioteko: Herman Ranes (reelekto)
Responsulo pri la arĥivo: Torstein Kvakland (reelekto)
Elekta komitato: Jørgen G. Bosoni (reelekto) kaj Kjell Heggvold Ullestad (reelekto)

**Aliaj enklubaj postenoj de klubanoj dum 2021 kaj 2022**
Redakcio de la nova vortaro: Jardar Eggesbø Abrahamsen, Jørgen G. Bosoni, Herman Ranes kaj Kjell Heggvold Ullestad.

**Estraraj postenoj de klubanoj en NEL kaj Legaco Uhlen en 2021 kaj 2022 post la Landa Kunveno en 2021**
Vicprezidanto de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Revizoro de NEL: Ulf Stenhaug
Estrarano kaj prezidanto de Legaco Uhlen: Herman Ranes
Estrarano de Legaco Uhlen: Judith Parelie Abrahamsen
Estrarano de Legaco Uhlen: Ulf Lunde (loĝanta en Os)

**Aliaj eksterklubaj estraraj postenoj de klubanoj dum 2021 kaj 2022**
Prezidanto de Akademia Esperanto-Forumo: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Estraranoj de Akademia Esperanto-Forumo: Herman Ranes, Kjell Heggvold Ullestad

**Aliaj eksterklubaj postenoj de klubanoj dum 2021 kaj 2022**
Anstataŭanto por NEL en la Domkomisiono: Herman Ranes
Redaktoro de la TTT-paĝaro de NEL: Jardar Eggesbø Abrahamsen
Gazetara Servo de NEL: Torstein Kvakland
Komisiono de NEL pri radio kaj televido: Christian Fossen
Kunadministranto de la TTT-paĝaroj de NEL kaj NJE: Judith Parelie Abrahamsen
Delegito de UEA: Ulf Stenhaug
Vicdelegito de UEA: Torstein Kvakland
Fakdelegito de UEA: Jardar Eggesbø Abrahamsen (lingvistiko)
Grafikisto de *Norvega Esperantisto*: Judith P. Abrahamsen (muntas nur la frontpaĝon kaj *Inter Ni Dirite*)

Raportis Jardar Eggesbø Abrahamsen.
Aprobita de la Jarkunveno de GET la 6an de marto 2023.